

& Kanto de l' sklavo:

< Rekante 36 el 71 batoj por strofo, entute 355 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Aŭtunaj floroj, La Marto, 1911). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Recepto por fari bonajn versaĵojn.>

(#Melodio:

/MiMi LaLa SoSo LaLa doTi La So; dodo TiTi dodo rere sofa mi do; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; dodo TiTi dodo rere sofa mi do;

(#Rekantaĵe: Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do; mi redo TilLa Ti doTi La Mi; Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do o)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Nun mi hele vidas, ke la sorto mia ;
estas alligita al vi per kateno, ; ke mi
nune ĉiam kun vi devos iri, ; ke mi
certe ne sukcesos jam akiri; liberecon,
mia nova suvereno!

(×: **Emas mi poeme paŝi ; per piedoj
plankon draŝi ; kaj en la ve2rsoj
mi2n kaŝi ; Emas mi poeme paŝi ; per
piedoj plankon draŝi.**)

'2 Multefoje mi forĵetis mian plumon, ;
eĉ emblemon vian, stelon kvinradian, ;
en la koro fajron mi estingi penis,; sed
vi senkompatate ĉiam min ekprenis ; kaj
min pluen, pluen trenis, sklavon vian.
.....

'3 Al vi apartenas nune vivo mia, ; ĉio,
kion jaroj lasis en la koro; vin mi nune
sekvas kiel somnambulo, ; tute
kontraŭvole, tute sen postulo ; kaj mi
jam ne revas eĉ pri laŭr' kaj gloro.

'4 Kie vi nur prenis tiun sorĉan forton?
; Vi tra landoj marŝas sen la sang' sur
glavoj, ; sen kanonoj, nur kun via verda
stelo, ; kaj vin malgraŭ tio sekvas sen
ribelo ; ĉiam novaj, blinde obeemaj
sklavoj.

'5 Pli kruelan, ol la famaj uzurpantoj; vi
alportis al ni en la mondon moron; ili
piedbatis homajn liberecojn, ; de la
landoj ŝiris partojn, limojn, pecojn, ;
sed viŝiras el la brustoj nian koron.)